

Sed vortaristoj kaj poetoj estas nur la avangardo en nia paca batalo. Ĉiuj Esperantistoj evoluigas nian lingvon, jam tiel esprimovan, jam tiel estetike plaĉan, en tiu direkto de semantika rafiniteco kaj honesteco. Esperanto estas videble tre taŭga ilo por reklamado kaj propagando. Mallarĝmensaj propagandistoj, kiuj celas nur konvinki sen atenti la etikon de la metodo, jam degenerigis preskaŭ ĉiujn naciajn lingvojn, uzante ilin en publikaj verkoj senrespondece kaj sloganece. Ni zorgu ke, kiom ajn fortaj estas niaj opinioj, ni ne tiel misuzu Esperanton. Pro la speciala etoso de la Movado, la lingvo restas pli lingvo de sinceruloj ol iu ajn nacia lingvo. Ĝi restu tia! Kaj ĉiu Esperantisto povas helpi.

Belaj, kortuŝaj, sanktaj al ni ĉiuj estas tiuj vortoj: amo, homfrateco, interkompreniĝo, paco. Sanktaj estas tiuj emociaj signoj en Universala Kongreso: tiuj larmoj en la okuloj, tiuj impulsaj manpremoj kun eks-malamikoj, tiu rifuzo akcepti la artfaritajn malamojn de niaj registaroj; sanktaj estas la kisoj kaj la kantoj, la flago brodita per diversaj urbonomoj, tiu stelo de Espero, printempkolora, kiu brilas ne nur sur niaj brustoj, sed en niaj koroj. Sed tiuj noblaj kaj dolĉaj emocioj ne povas plene interfratigi la suferantan homaron; vera kompreno estas io pli komplika ol obtuza ĝenerala pardonemo; ĝi postulas seriozan atenton al la signifo de vortoj. Internacia semantiko estas ankoraŭ preskaŭ novnaskita; mi ne povas profeti la detalojn de ĝia evoluo; sed mi certas ke la ebloj sur tiu kampo estas grandegaj. Sankta, malfacila, belega estas tiu lukto en la individua koro por venki antaŭjuĝojn, doni veran homfratan amon, senkondiĉan aman amon; sed eble same valora kaj progresiga estas tiu lukto en la individua intelekto por serĉi la veran veron.

31 : 42/49 : 3-05

LA PLEJ MULTE PAROLATAJ LINGVOJ

far Prof. D-ro Sidney S. CULBERT

La tabelo kunaperanta listigas la lingvojn de la mondo kiuj estas parolataj de almenaŭ unu miliono da personoj. La nombro indikas, per la plej proksima miliono, kiom da personoj parolas la koncernan lingvon. La taksoj, bazitaj sur la plej freŝdataj fontoj, rilatas la situacion je jarmezio, 1957. Nombro interkrampa tuj post la nomo lingva direktas al noto same numerita. Kursive presitaj vortoj ne estas Esperantaj, kvankam pluraj, ekzemple „madura”, „makua”, „ngala”, „njanĝa”, „orija”, kaj „ruanda”, estas senŝanĝe Esperantigindaj.

Afgana	11	Guzerata (Hindujo)	20
Afrikansa	4	Gvarana (plejparte	
Albana	2	Paragvajo)	2
Amhara (Etiopio)	8	Hakka ⁴⁾ (Ĥinujo)	19
Anama (Vietnamo, Azio) ...	23	Hausa (Afriko okcidenta kaj	
<i>Andhra</i> (aŭ <i>Telugu</i> , kiun		centra)	13
vidu)		Hebrea (plejparte Izraelo) ...	2
Angla	275	Hinda ¹⁾ ⁵⁾ (Nepre vidu la no-	
Araba	74	ton)	146
Armena	4	Hindustana ⁵⁾	
Asama ¹⁾ (Hindujo)	7	Hispana	139
Azerbajĝana (Sovetunio;		Hungara (aŭ Madjara)	12
Irano)	5	Ĥina ⁶⁾	
Balia (Indonezio)	4	<i>Ibibio-Efik</i> (Afriko okciden-	
Baluĥa (Irano; Pakistano) ..	2	ta)	1
Baŝkira (Sovetunio)	1	<i>Igbo</i> (aŭ <i>Ibo</i>) (Afriko okci-	
Bataka (Indonezio)	1	denta)	4
Bengala ¹⁾ (Pakistano; Hin-		<i>Iloko</i> (Filipinoj)	2
dujo)	77	Indonezia (Nacia lingvo bazi-	
Berbera ²⁾ (Afriko norda)		ta sur malaja, kiun vidu) ...	
Birma	14	Itala	57
Blankrusa (plejparte Sovet-		Japana	95
unio)	10	Java	42
Buginesa ³⁾ (Indonezio) ...	1	Jida ⁷⁾	
Bulgara	7	<i>Joruba</i> (Afriko okcidenta) ...	4
Ĉeĥa (Ĉeĥoslovakujo)	9	Kajzaka (Sovetunio)	4
Ĉuvaŝa (Sovetunio)	1	Kamboĝa (Azio)	3
<i>Dajak</i> (Borneo)	1	Kanara ¹⁾ (Hindujo)	19
Dana	5	Kantona (Ĥinujo)	43
Esperanta	1	Kartvela (aŭ Georga)	
Estona	1	(Sovetunio)	1
Evea (Afriko okcidenta)	1	Kaŝmira ¹⁾	2
Finna	4	<i>Kerala</i> (aŭ <i>Malajalam</i> kiun	
Flandra (formo de Nederlan-		vidu)	
da kiun vidu)		<i>Kherĉari</i> (Hindujo)	3
Franca	70	Kiĉŭa (Ameriko suda)	6
<i>Fulani</i> (Afriko okcidenta) ...	6	<i>Kikuju</i> (aŭ <i>Gikuju</i>) (Kenjo,	
Galica (Hispanujo)	2	Afriko)	1
<i>Galla</i> (Etiopio)	3	Kirgiza (Sovetunio)	1
<i>Ganda</i> (aŭ <i>Luganda</i>) (suda		Korea	32
Ugando, Afriko)	2	Kurda (Turkujo, Irano, Ira-	
Germana	120	ko, Sovetunio, Sirio)	5
Gonda (Hindujo)	1	Laosa (Azio)	1
Greka	8	Latva	2

Litova	3	Serbakroata (Jugoslavujo) ...	16
Madura (Indonezio)	6	Siana	19
Makedona (Jugoslavujo) ...	1	Sindhi (Hinduĵo: Pakistano)	5
Makua (Afriko sudorienta) ..	1	Sinhala (Cejlono)	7
Malaja (kaj Indonezia)	69	Slovaka (Ĉeĥoslovakujo) ...	3
Malajalam ¹⁾ (aŭ Kerala aŭ		Slovena (Jugoslavujo)	2
Malabara) (Hinduĵo)	31	Somala (Afriko orienta)	3
Malgaŝa (Madagaskaro)	4	Sotho (aŭ Suto aŭ Sesotho aŭ	
Malinke-Bambara-Diula		Sesuto) Norda (Afriko	
(Afriko okcidenta)	3	suda)	1
Mandarena (Ĥinuĵo)	432	Sotho (aŭ Suto ktp.) Suda	
Marathi ¹⁾ (Hinduĵo)	31	(Afriko suda)	1
Min (Ĥinuĵo)	36	Suahila (Afriko orienta)	10
Mordova (Sovetunio)	1	Sunda (Indonezio)	13
Mossi (Afriko orienta)	2	Sveda	9
Ndongo ⁸⁾ (aŭ Kimbundu, aŭ		Tagala (Filipinoj)	8
Mbundu) (Angolo, Afriko)	1	Taĵiki (Sovetunio)	1
Nederlanda	17	Tamila ¹⁾ (Hinduĵo; Cejlono)	34
Nepala (Hinduĵo; Nepalo) ...	3	Tatara de la Volgo	
Ngala (aŭ Lingala) (Belga		(Sovetunio)	3
Kongo, Afriko)	1	Telugu ¹⁾ (Hinduĵo)	38
Njanĝa (Afriko sudorienta)...	1	Tibeta	7
Norvega	4	Tulu (Hinduĵo)	1
Orija ¹⁾ (Hinduĵo)	14	Turka	23
Persa (plejparte Irano kaj		Turkomana (Sovetunio) ...	1
Afganuĵo)	20	Tŭi-Fante (Afriko okcidenta)	2
Pola	33	Uighur (Ĥinuĵo nordokciden-	
Portugala	72	ta)	3
Provenca (Okcitana)		Ukrajna (aŭ Rutena) (plej-	
(Francujo suda)	9	parte Sovetunio)	40
Punĝaba ¹⁾ (Hinduĵo; ...		Umbundu ⁹⁾ (aŭ Mbundu)	
Pakistano)	23	(Angolo, Afriko)	2
Rajasthani (Hinduĵo)	16	Urdua ¹⁾ (Pakistano; Hin-	
Ruanda (aŭ Kiruanda)		duĵo)	50
(Afriko sude centra)	6	Uzbega (Sovetunio)	7
Rumana	17	Ŭu (Ĥinuĵo)	39
Rundi (aŭ Kirundi) (Afriko		Visaja (Filipinoj)	8
sude centra)	2	Zulua (Afriko suda)	3
Rusa (Nur Grandrusa)	153	Xhosa (Afriko suda)	3

Notoj.

¹⁾ Unu el la dek kvar lingvoj de la konstitucio hinduja. ²⁾ Tie ĉi konsiderata kiel grupo de dialektoj. ³⁾ Kvankam jam uzita en Espe-

ranto, la vorto „buginesa” estas evitenda — la „-nes-” estas nenecesa. ⁴⁾ La vorto „hakka” aperas en la Enciklopedia Vortaro de Wŭster. Ĝi estas evitenda pro la duobla konsonanto, sed preferinda formo ne proponas sin — „haka” tute ne taŭgas. ⁵⁾ Hinda kaj urdua estas esence la sama lingvo, hindustana. Kiel la oficiala lingvo de Hinduĵo ĝi estas skribata en modifita literaro araba kaj nomiĝas „urdua”. Estas iuj diferencoj inter la vortaroj de la du formoj. ⁶⁾ Vidatu „mandarena”, „kantona”, „ŭu”, „min”, kaj „hakka”. La nacia lingvo estas normigita formo de mandarena kiel parolata en la ĉefurbo. ⁷⁾ Parolantoj de jida estas inkluditaj kun la parolantoj de germana kvankam, laŭ pluraj kriterioj, jida povas esti konsiderata kiel aparta lingvo. Laŭ la sole lingvistika vidpunkto ĝi multe pli diferencas de la germana ol, ekzemple, la flandra diferencas de la nederlanda. Proksimume kvin milionoj da personoj parolas jidan. ⁸⁾ Ndongo ne povas havi la formon Esperantan „ndonga” ĉar tiu vorto estas la nomo de tute alia lingvo. ⁹⁾ La vorto „mbundu” estas evitenda ĉar ĝi nomas du tute diferencajn lingvojn, „ndongo” kaj „umbundu”.

371.22 : 378(042)

KION LA SOCIO POVAS KAJ DEVAS FARI POR UTILIGI LA TALENTULOJN?

de rektoro K. SÖDERBERG

Prelego en Internacia Somera Universitato, Kopenhago, 1956

Dum la du jardekoj inter la grandaj mondmilitoj la nombro de studentoj ĉe universitatoj kaj altlernejoj kreskis tre rapide en la plej multaj landoj. Multloke eĉ estiĝis timo pri estonta trosatiĝo de laborforto en la intelektaj profesioj kaj pri la ekesto de universitata proletaro, kaj oni limigis la alir-eblojn al certaj edukejoj kaj karieroj per diversaj aranĝoj. Oni tamen deziris eviti, ke tia limigo fariĝu dependa de la ekonomiaj cirkonstancoj de la aspirantoj, kaj entute volis fari la selekton al la universitata edukado kiom eble sendependa de ekonomiaj faktoroj, kaj pro tio oni iniciatis grandskalajn disponojn por plifaciligi la eblojn de studado de neriĉaj talentuloj. Tiu agado, kiun praktikis registaroj, universitatoj, studentaj organizaĵoj kaj interesataj individuoj, estis des pli urĝa ĉar la stud-ebloj en certaj rilatoj fariĝis malpli favoraj ol antaŭe. La ĝenerala ekonomia evoluo dum la intermilita tempo kunhelpis al altiĝo de la vivkostoj kaj aliaj elspezoj dum la universitataj studjaroj. Por la plimulto de la studentoj tio signifis pli altan ŝuldiĝon kaj pli grandan devigon efike akceli la studadon por atingi la ekzamenon kiel eble plej baldaŭ. Samtempe la kreskanta konkurado kaŭzis plialtigon de la postuloj pri scioj kun sekvanta plilongigo de la studtempo.